# *Raúl Castro dialogis kun la ?enerala sekretario de la komunista partio de Vjetnamio*



**Raúl Castro, unua sekretario de la komunista partio de Kubo**

Havano, dec 3 (RHK) En la kadro de la 60-a datreveno de la rilatoj inter Kubo kaj Vjetnamio, festata ?i-merkrede, la unua sekretario de la centra komitato de la komunista partio, Raúl Castro, telefone dialogis kun la ?enerala sekretario de la komunista partio de Vjetnamio, Nguyen Phu Trong.

La dialogo estas taksita kiel frateca kaj estis oportuna okazo por ke amba? gvidantoj konfirmu la amikecon, solidarecon kaj reciprokan fidon, kiu unuigas amba? landojn, partiojn kaj  registarojn dum ses jardekoj.

Nguyen Phu gratulis Kubon pro la avancoj en la procezo por aktualgi sian sociekonomian modelon kaj anka? rekonis la sukcesojn atingitajn en la frontado al la pandemio de la Covid-19.

Siaflanke, Raúl dankis al Vjetnamio pro la senkondi?a subteno al la kuba Revolucio, aparte en la batalo kontra? la ekonomia sie?o ekonomia, komerca kaj financa trudita de la sinsekvaj usonaj administracioj dum preska? ses jardekoj.

Amba? ratifis la decidon plu fortigi siajn historiajn ligojn fratecajn, for?itajn de la gvidantoj Fidel Castro kaj Ho Chi Minh.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/241394-raul-castro-dialogis-kun-la-generala-sekretario-de-la-komunista-partio-de-vjetnamio

Radio Habana Cuba